

Pri la venonta Kurs-sesio de Internacia Feria Altlernejo, IFA, somero 1985.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 majo 30 kaj junio 01.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-145/Radiokasedo-145-1-905-1985-julio-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-venonta-Kurs-sesio-de-IFA-somero-1985.mp3>

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Abundas la eblecoj feriadi parolante esperanton. En multaj landoj estas organizitaj turismaj aŭ kulturaj renkontiĝoj. En Svislando okupiĝas pri tio Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Jen hodiaŭ ni legas al vi la ĉefajn partojn el diversaj informiloj, kiujn vi povas peti skribante al Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, 3015 Berno.

A.- Ĉiusomere organiziĝas universitat-nivelaj kursoj sub la nomo Internacia Feria Altlernejo (IFA). Jen kio anonciĝas tiurilate por la monatoj julio kaj aŭgusto. Ni citas:

Cl.- Kurso No 1. De la 8-a ĝis la 12-a de julio. Progresiga kurso de esperanto kaj informado pri komputiko. Instruos Ilona Koutny, hungarino, lekcisto en la esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato, redaktoro de la ravuo Internacia Komputado.

A.- Jen kiel estas resumita la celo de tiu kurso: Perfektiĝi en la praktiko de esperanto per ekzercoj adaptitaj al la lingvo-nivelo de la partoprenantoj kaj ricevi informojn pri komputiko. Komputistoj lernantaj esperanton havos la okazon plulerni la lingvon kaj intimiĝi kun la faka vortaro pri komputiko. Esperantistoj nenion sciantaj pri komputiko ekintimiĝos kun kelkaj aspektoj de tiu fako pli kaj pli ligita al esperanto.

Cl.- La dua kurso okazos de la 15-a ĝis la 19-a de julio. Ĝi titolas: Andreo Cseh en ĉiuj facetoj; vivo, pedagogiaj laboroj, propagandaj verkoj, ceteraj laboroj, influo. Instruos Ed. Borsboom, nederlandano, instruisto de lingvo kaj literaturo en supera lernejo, metodologo kaj verkisto.

A.- Antaŭ 50 jaroj Andreo Cseh alportis veran revolucion en la instruadon de esperanto kaj en la organizon de la esperanto-movado, revolucio daŭre pens-instiga. Intimiĝi kun la vivo de tiu neordinara pastro kaj pedagogo humurplena, jen tre interesa maniero intimiĝi ankaŭ kun la historio de esperanto kaj de ties literaturo.

Cl.- La kurso numero 3 okazos de la 22-a ĝis la 26-a de julio kaj estos dediĉita al la etimologio de esperanto - analizo de la Universala Vortaro. Instruos d-ro István Szerdahelyi, hungaro, esperanto-profesoro ĉe la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd, interlingvisto, metodologo kaj verkisto.

A.- Tiel skemiĝas la kurso: Laŭ kiuj principoj elektis Zamenhof la vortojn por la Universala Vortaro? Laŭ kiuj principoj formis Zamenhof la grafikan kaj fonetikan korpon de la vortoj? Kiel rilatas la signifo de la vorto al ĝia etimo? Kiel respegulas la signifo-reto de la Universala Vortaro la idearon de Zamenhof kaj de lia tempo kaj kulturo? Kiel evoluis la signifo-kampo de la fundamentaj vortoj dum la pasintaj preskaŭ cent-jaroj?

Cl.- Ankaŭ la kvaran kurson gvidos d-ro István Szerdahelyi de la 29-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. La temo estos: Lingvo-filozofio kaj filozofiaj lingvoj.

A.- La skemo de la kurso estas: Intimiĝo kun la nekonata kaj tre interesa historio de interlingvistiko: Lullus, Descartes, Mersenne; la angla skolo: Bacon, Dalgarno, Wilkins; Comenius; Leibniz, Couturat, Peano.

Cl.- Dum la semajno de la Universala Kongreso ne okazos kursoj kadre de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Kaj post la Universala Kongreso okazos du kursoj pri la tradukarto. Ambaŭ komenciĝos la 12-an de aŭgusto. La kurso, kiun gvidos Georges Lagrange, franco, konata kiel unu el la plej kapablaj nuntempaj esperanto-tradukistoj, tiu kurso daŭros unu semajnon. Ĝi interesos la franc-parolantojn. La germanlingvanoj povos studi dum du semajnoj kun d-ro Dirk Willkommen, germano, profesia tradukisto, metodologo, redaktoro de la revuo Esperanto Aktuell.

A.- La komentario al la kurso por franclingvanoj, kiu estas titolita: *Lertiĝo en la tradukarto*, diras: Post enkonduko, la kursanoj ekzerciĝos en la arto traduki kaj juĝi tradukojn pere de ekzemploj. Kritikoj kaj diskutoj progresigos ĉiujn. La taskoj, kun kreskanta malfacileco, rilatos al klasika kaj moderna literaturo, al gramatike tipaj frazoj, el tekniko kaj teatro. Kolektivaj ekzercoj donos ideon pri certaj traduk-malfacilaĵoj.

Cl.- La celo de la kurso pri tradukado el la germana lingvo difiniĝas tiel. La unuan semajnon la kurso havas enkondukan karakteron:

A.- Tiu enkonduka kurso estas por komencantoj, kiuj jam regas la lingvon kaj interesiĝas pri tradukado. La kurso enkondukas en la problemaron, konsilas pri helpiloj, traktas tradukad-problemojn kaj ekzercas elektitajn ekzemplojn kaj ne tro komplikajn tekstojn.

Cl.- La partoprenantoj de tiu enkonduka kurso povos daŭrigi per partopreno en la progresiga kurso, kiu disvolviĝos la duan semajnon de la 19-a ĝis la 23-a de aŭgusto.

A.-Tiu kurso ekzercas diversajn teksto-tipojn kaj atendas, ke la partoprenantoj pli aldonu mem al la kurso. Pli vastan traktadon havos la kuna traduko-kritiko. Ĝi estos pli fleksema temare kaj labormaniera, adaptiĝante al la realaj bezonoj de la partoprenantoj.

Cl.- La oka kaj lasta kurso okazos la lastan semajnon de la monato aŭgusto. Ĝi estos dediĉita al perfektigi en la franca lingvo, por esperanto-parolantoj. Instruos d-ro Michel Frésard, franclingva sviso, filologo, eksprofesoro universitata, administranto de Kultura Centro Esperantista.

A.- La komentario diras: Multaj esperantistoj ekstudis la francan lingvon kaj deziras perfektigi en la praktiko de tiu lingvo. Helpe de tre variaj ekzercoj parolaj, skribaj kaj legaj ili certe progresos. Ne temas pri kurso por komencantoj, sed por tiuj, kiuj jam almenaŭ kapablas kapablas legi la francan kaj pli malpli balbute paroli. La Chaux-de-Fonds estas franclingva regiono, kaj la partoprenantoj povos tiel praktiki la lingvon vizitante muzeojn kaj magazenojn kaj spektante filmojn.

Cl.- Ni menciuj, ke paralele al tiuj kursoj okazos esperanto-staĝoj por komencantoj kaj por progresantoj kaj staĝoj por esperanto-instruistoj.

A.- Esperanto-instruistoj aŭ kurs-gvidantoj sentas la bezonon metodologie kaj pedagogie plikleriĝi. Ili povas aliĝi al la esperanto-staĝoj kiel esperanto-instruantoj. Ili tiam havos la okazon ekpraktiki modernajn instru-teknikojn: la aŭd-vidan, la perbilden, la pergestan kaj la programitan.

Cl.- Tiuj klarigoj montris al vi, ke diversnivelaj grupoj povas restadi en La Chaux-de-Fonds. Dum la lertaj esperantistoj havas kursojn en esperanto, la aliaj havas la eblecon lerni la lingvon.

A.- La venontan semajnon ni raportos pri la loĝeblecoj, interalie pri la lueblaj feri-loĝejoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*